


KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto



© Martinus Institut 1981

martinus.dk

Simbolo n-ro 6 La viva estulo

N-ro 1, 2023

Esperanto

Enhavo

La regno de la difilo. Gardanĝeloj en la tergloba konscio - de Martinus, parto 3 el 3.....	3
La ideala vivsinteno - de Martinus	6
Prefere krozi sur la Atlantika maro per trunkflosilo ol havi laboron en oficejo - de Martinus	7
La monda ŝtato - de Ole Therkelsen, parto 1 el 2	9
Reklamkampanjo por Esperanto - de Etsuo Miyoshi	16

Resumo de la klarigo pri simbolo 6 - La viva estulo 1

La viva estulo estas eterna principo: “mio” - la kreanto, “kreokapablo” kaj “la kreaĵoj”. Por la tri elementoj en ĉi tiu principo uzis Martinus la nociojn X1, X2 kaj X3. Laŭ kerna analizo la estulo estas eterna, senmorta “io kio estas”. Ĉi tiu kerna analizo tamen estas absolute nealirebla por rekta fizika sensado. Tio kio rekte estas sensebla de la estulo, estas nur tio, kio estas kreita. Kaj ĉio kreita estas pereema. La viva io en la estulo, estas neskueble la mio kaj ĝia eterna aŭ kosma vivstrukturo. “La morta” aŭ pereema io estas ĝia fizika korpo kaj ceteraj strukturoj, kiuj nur estas kreitaj realaĵoj. Centraj detaloj en la simbolo:

- La plej supra blanka kampo simbolas la mion aŭ X1 de la viva estulo.
- La meza kampo simbolas la kreokapablon aŭ X2 de la mio.
- La plej malsupra kampo simbolas la kreitan ion aŭ X3.
- La violkoloro esprimas la plej altan energion de la vivo, la patrina energio. En ĉi tiu energio ĉiuj ĉeffunkcioj de la vivo estas enradikiĝintaj.
- La rondaj koloritaj kampoj simbolas la bazajn talentokernojn aŭ “spiralcentrojn” de la mio.
- La ses koloritaj kampoj simbolas la kreitajn korpojn:
 - ruĝa - la instinktokorpo
 - oranĝkolora - pezokorpo
 - flava - la sentokorpo
 - verda - inteligentokorpo
 - blua - intuiciokorpo
 - indiga - memorokorpo

Ĉi tiuj korpoj konsistigas la konscion de la estulo, per kiuj ĝia kreado kaj spertado de la vivo troviĝas. Pro tio ke la vivspertado estas eterna procezo de ŝanĝiĝo aŭ kreado, ŝanĝiĝas ĉi tiuj bazenergikorpoj laŭ la ritmo de la sopiro kaj volo de la estulo. Per tio la daŭra evoluo estas konservata tra ses vivsferoj.

La oranĝkolora cirklo simbolas la fizikan korpon de la estulo. La radioj kaj la kruco esprimas la eternan spiritan strukturon.

Legu la plenan simbolklarigon de Martinus en *La Eterna Mondbildo 1*.



La regno de la difilo. Gardanĝeloj en la tergloba konscio - de Martinus, parto 3 el 3

La artikolo estas daŭrigo de “Gardanĝeloj en la servo de la nacio” (n-ro 1-2022) kaj “La gardanĝeloj de la lumo kaj la mallumo” (n-ro 2-2022).

1. Kiam talentokerno plenumas sian mision, la tagkonscio liberiĝas por aliaj taskoj

Per la analizo de la kreiĝo de la talentokerno ni ricevas vivan ekkomprenon de tio, kiel organismo iom post iom konstruiĝas. Kiam viva estulo per certa intereso ekkulturas iun aŭ alian formon de manifestado kaj per tio ripetas la diversajn movospecojn aŭ energiaktivigojn, sur kiuj tiu formo de manifestado baziĝas, tiuj movospecoj aŭ energiaktivigoj fariĝas kutimo. Kiam movospeco estas fariĝinta kutimo, tio signifas ke ĝi pli aŭ malpli povas aktivigi sin mem, tiel ke la koncerna viva estulo ne bezonas partopreni tiun ĉi aktivigon. Tiumaniere la viva estulo ricevis kapablon sin movi sen mem esti okupita pro la partoprenado en tiu movo. Ni povas promeni laŭ vojo kaj samtempe paroli kun alia estulo sen bezoni dediĉi al la movado de la kruroj iun konsiderindan kvanton da maldorma tagokonscia atento. Nur tiam, kiam io eksterordinara okazas, nia propra mio, el certa vidpunkto esprimebla kiel “la patromio”, devas interveni. Tiam la koncerna parto de la kruroj doloras. Kaj per la doloro, la patromio estas atentigita pri la okazaĵo kaj povas fari ion por forigi la kaŭzon de la doloro. Kiam la doloro estas forigita, la tagokonscio denove liberiĝas de la zorgado pri la funkcio de la kruroj. Tiam la kruroj refoje mem povas plenumi sian mision, aŭ tion, por kio ili estas destinitaj.

2. Nia organismo estas kombino de enkarniĝintaj estuloj de subaj spiraloj

Efektive ĉiu organo en la organismo estas konstruita kaj tenata en pozicio fare de talentokerno. Sekve la korfunkcio, la pulmofunkcio, la spirado, la glandaj funkcioj ktp estas koncentritaj ĉirkaŭ, kaj bazitaj sur, sia propra talentokerno, kio efektive signifas mio kun ties superkonscio. Tia talentokerno do estas viva estulo. Organismo de viva estulo sekve efektive konsistas el serio da vivaj estuloj de subaj spiraloj, kiuj estas kunligitaj dank’ al sia kapablo kunlabori favore al pli granda tuto. La apero de nia propra organismo kiel viva estulo sekve estas kombino de enkarniĝintaj vivaj estuloj de subaj spiraloj. Tiel, ĉiu organo ekde la cerbo, la koro, la pulmoj, la stomako kaj suben al la plej malgrandaj glandaj kaj ĉelaj funkcioj estas vivaj estuloj, enkarniĝintaj en nian organismon, kaj kunligitaj pere de nia propra mio kaj ties speciala sinteno, speciala avido kaj evoluŝtupo en la spiralciklo. La mio devas uzi la kunlaborantecon de tiuj en subaj spiraloj situantaj vivaj estuloj por plenumi siajn specialajn dezirojn pri kreado kaj vivspertado. Kaj ĉar tiuj sube situantaj estuloj en la sama maniero ĝuste bezonas tian kunlaboron, ja, eĉ tute ne povas kontentigi sian avidon por vivspertado kaj manifestado krom per ĝuste tia kunlaboro, ni ĉi tie vidas kiel dia la tuta vivprincipo efektive estas, kaj kiel necese estas, ke ĝuste ĉiuj tiuj mikromioj

kunlaboru en la intereso de la tuteco, same kiel ni vidas, kiel estas absolute necese, ke la makromio sammaniere kreu kondiĉojn por ne mem ĝeni tiun kunlaboron.

3. La makromio mem suverene regas la organismon

Ĉu la makromio do povas ĝeni la kunlaboron de tiuj estuloj kaj per tio ilian vivon? – Jes, en la plej alta grado. Ĝi estas la ĉefmio kaj havas la suverenan potencon super la tuta organismo. Ĝi decidas, ĉu tiu organismo estu flegata kaj zorgata laŭ la leĝoj de sano kaj bonfarto, aŭ ĉu ĝi estu malzorgata kaj mistraktata ekzemple per ĝuo de alkoholo aŭ alia misinflua ĝuado de venenaj aŭ malsanigaj substancoj, kiuj tute ne taŭgas kiel nutraĵo. Ĝi ankaŭ povas decidi, ĉu la organismo havu la necesan kvanton da ripozo kaj dormo aŭ ne havu ĝin. Ĝi povas malzorgi la kreadon de kondiĉoj por la perfekta kunlaboro inter siaj mikroestuloj, kaj tiam ĝi mem fariĝas malsana kaj senpova. Tiel videblas ke organismo efektive estas institucio, kies funkciado estas realigata de diversaj grupoj de vivaj estuloj. Ĉiu grupo de estuloj do efektive estas iuspeca specialisto por fari specialan energiaktivigon, specialan laboron kiu estas necesa por la tutaĵo. Tiu tutaĵo ja estas la organismo de la makromio, kiu por tiuj mikroestuloj estas ilia universo. La organismo de viva estulo tiel estas scenejo, mondo, en kiu grandega nombro da estuloj havas ŝirmon, loĝejon kaj eblon labori, kaj per tio la por ili necesajn kondiĉojn por vivo kaj sortorealiĝo.

4. La reĝa tasko de la makromio en la mikrokosmo

Organismo estas grupo de vivaj estuloj sur diversaj ŝtupoj, reprezentantaj diversajn supraĵajn kaj subajn spiralajn ciklojn. Kiel la plej alta aŭtoritato por tiu grupo de vivaj estuloj do ekzistas tiu mio, kiu suverene regas la organismon, nome la “makromio”. Rilate al tiu mio, ĉiuj aliaj mioj estas subordigitaj, ĉar ili ĉiuj sen escepto apartenas al subaj kosmaj spiralcikloj. Tial ni devas kompreni kaj esprimi tiujn estulojn kiel mikrokosmon. Kaj simile, la makromio montriĝas kiel “reĝo” aŭ la plej alta reganta faktoro en tiu kolekto de vivaj estuloj, kiu konsistigas ĝian organismon. Sed ĉar ĝia interesosfero reprezentas multajn formojn de avidoj kaj deziroj, multajn diversajn formojn de vivtravivaĵoj kaj kreoprocesoj, ĝi bezonas amason da helpantoj, ja ne nur milojn, sed multege da estuloj, kiuj nombriĝas en milionoj. Sed la makromio ja ne kapablas korespondi kun ĉiu unuopa individuo en tiu arego da estuloj. La kunlaboro inter la makromio kaj tiuj mikroestuloj ja ankaŭ estas realigata de tuta serio da “subreĝoj”, kiuj sub si havas helpantojn, administrantojn kaj gvidantojn kaj tiel daŭre en la subajn spiralajn ciklojn interne de la sama organismo. Tiuj subreĝoj de la makroestulo regas ĉiu sian regionon en la intereso de la tutaĵo aŭ la makroindividuo, same kiel la makromio estas ricevinta la superan komandon super tiu kolosa regno por ĝin regi kaj gvidi en la intereso de la tutaĵo, ne nur interne ene de la propraj internaj regionoj, sed ankaŭ eksteren, tiel ke la tuteco de tiu organismo aperas kiel ŝtato, universo aŭ galaksio, kiu estas plene en kontakto kun la ekstera mondo kaj la intereso de la tutaĵo.

5. La tergloba talentokerno por la mortiga principo

Niaj subreĝoj, kio signifas la provincestrojn por la regionoj de niaj kapabloj kaj talentoj, estas la mioj de niaj talentokernoj. Ĉar tiuj subreĝoj ja havas la taskon regi siajn regionojn en kontakto kun la tutaĵo interne de la organismo, ni povas nomi ilin “gardanĝeloj”. Ĉar la tergloba estas organismo, kiu troviĝas sur la sama ŝtupo en sia spirala ciklo kiel la terhomoj, ĝi kreas la samajn kondiĉojn, kiel la terhomoj faras en la sia. Tial ni per rigardo al la tergloba mio kaj ĝia organismo, kiu ja estas nia provizora hejmloko en la universo, povas vidi nian propran organismon kaj per tio, la terenon de nia propra regno.

La tergloba mio mem estas nia primara gardanĝelo, nia reĝo. Sub tiu venas la talentokerno de la tergloba mio por la aktivigo de la mortiga principo, kiu ja ĝis nun estis la plej supera kaj superrega ene de la regiono de ĝia organismo. Kun la paso de tempo, tiu gardanĝelo ricevis la nomon “la malbonulo” aŭ “la diablo”. Ĝi estas gardanĝelo kaj absolute nemalhavebla en la ebligo

de vivtravivado kaj manifestado kadre de la cikloprincipo. El kosma vidpunkto, tiu gardanĝelo ne estas diablo, sed same dia en sia naturo kiel lumaj anĝeloj. Sen tia gardanĝelo neniu ajn vivtravivado povus okazi. Ĉu ni do ne devas danki kaj laŭdi Dion, ke ekzistas tia gardanĝelo, kvankam ĝi estas la origino de ĉio, kio apartenas al la mensa mallumo? Jes, ĉar sen la agado de tiu estulo ne estus iu fono por lumtravivado. Kiel la estuloj fariĝus kapablaj travivi sin mem kaj siajn ĉirkaŭaĵojn sen kontrastoj? – Ĉia vivtravivado ja nur estas nuancoj aŭ gradoj de mallumo kombinita kun lumo. En la biblio tiu gardanĝelo estas esprimata kiel “la serpento”, kiu kaŭzis, ke Adamo kaj Eva aŭ la vivaj estuloj, povas frandi la fruktojn de la arbo de scio. Do estas tiu gardanĝelo, kiu estas malantaŭ la gvidado de la kreado de ĉiuj armiloj, kaj la el tio rezultanta kulmina kapablo, kiun la terhomoj tiukampe reprezentas.

6. La tergloba talentokerno por lummanifestado

En la terhoma menso nun estas kreita tre forta kaj malluma fono, sur kiu la lumo povas reliefiĝi kaj per tio fariĝi alirebla por sensado kaj travivado. Sed per tio la gardanĝelo de la mallumo ja finis sian mision interne de la psiko de la tergloba mio. Ĉar samgrade kiel tiu ĉi fono kreskis, densiĝis kaj fortiĝis, ja ĝuste estiĝis la eblo por la reliefigo de la lumo kaj per tio ties alireblo por travivado. Tiel la interesosfero de la tero samgrade fariĝis la lumo. Pli kaj pli da ripetitaj lummanifestaĵoj estis la rezulto, kaj ekestis eblo por reenkarneigo de la reĝo de la lumo, do talentokerno, kiu devos transpreni la interesosferon de la tergloba mio kaj krei lumon en ĝia teritorio. Kaj tia vicreĝo jam enkarniĝis en la psiko de la tergloba mio kaj estas do la primara gardanĝelo de ĉiuj lummanifestaĵoj. Tiu reĝo aŭ gardanĝelo respondecas pri la komencanta kreiĝo de ĉiuj humanaj religioj, ja, ĉiuj humanaj fenomenoj. Ĉio, kio esprimiĝas per la nocio “pli alta kulturo”, “la promesitaj novaj ĉielo kaj tero”, kio reale estas la samo kiel tiu de ĉiuj homoj sur la tero dezirata mondpaco, tio realiĝos sub ĉi tiu gardanĝelo de la homaro aŭ la tergloba talentokerno por lummanifestado. La teritorio de tiu ĉi gardanĝelo estas la loko de kie eliras la mondliberigantoj, same kiel la mallumaj mondliberigantoj eliras de la gardanĝelo de la mallumo.

7. La fizika enkarniĝo de la gardanĝeloj

Nun oni eble demandas, ĉu tiuj lumaj kaj mallumaj gardanĝeloj enkarniĝas, kaj kie estas iliaj fizikaj korpoj? Jes, kompreneble ankaŭ tiuj ĉi gardanĝeloj estas subordigitaj sub la leĝoj de la reenkarneigo kaj devas enkarniĝi en la materion kiel ĉiuj aliaj vivaj estuloj. Ili ja sammaniere devas utiligi mikroestulojn en sia regiono, alie ili ja ne povus krei organismojn, kaj sen organismoj ili ja tute ne povus labori. La mikroestuloj de ĉi tiuj gardanĝeloj estas la vivaj fizikaj estuloj, kiuj povas esti animitaj de ilia spirito aŭ la estuloj, por kiuj aktivigo de la specialaj specoj de manifestado, kiuj okazas sub la gardanĝeloj de lumo respektive mallumo estas granda vivmotiviga faktoro. Rilate al la fizika korpo aŭ organismo de la malluma gardanĝelo, ĝi estas identa kun ĉiuj estuloj kiujn ni nomas bestoj. La bestoj estas animitaj de la konscio de la malluma gardanĝelo kaj do konsistigas la fizikan korpon de tiu ĉi anĝelo. Ĉar tiu ankaŭ eniras en la sferon de la terhomoj kaj trovas ilojn kaj talentokernojn por la manifestadoj de la mallumo en la psiko de la terhomoj, tiuj samgrade estas mikroestuloj en la konscio aŭ psiko de la malluma gardanĝelo. Ĉi tiuj estuloj do efektive estas infanoj de ĉi tiu gardanĝelo. Pensu pri Valhalo kaj la aliaj mortigaj formoj de religioj! – Ĉie kie la zonoj de la mortiga principo troviĝas, ili estas la tereno de la malluma gardanĝelo. Dum la enkarniĝo de la malluma gardanĝelo komenciĝas en la viandomanĝanta planto kaj pluiras en bestoj kaj terhomoj, en kiuj ĝi mortos, la naskiĝo de la nova luma gardanĝelo komenciĝas en la terhomoj, kiuj komencas fariĝi humanaj kaj alproksimume amaj. La regno de la luma gardanĝelo estas ĉio, kio estas kulturkrea, celas forigi militon favore al humaneco kaj amo al la proksimumo. Ĉi tiu spirito estas enkarniĝinta en ĉiuj estuloj, kiuj, ĝis pli aŭ malpli granda grado, sin disponebligas por manifestado de lumo kaj amo.

8. La plej alta vivtravivaĵo

Se la makromio plenumas sian reĝan taskon laŭ la intereso de la tuteco internen en la regionojn de la mikroestuloj de sia organismo kaj eksteren al siaj ĉirkaŭaĵoj kaj kunestuloj, tiam ĉi tiu makromio ekzistas kaj aperas kiel viva estulo laŭ la bildo de Dio. Kompreni ĉi tiun respondecon de la makroestulo al la mikroestuloj, kunestuloj kaj makroestuloj estas kompreni la vivmisteron. Kompreni la vivmisteron en maldorma tagkonscia stato estas la samo kiel havi “kosman konscion”, konscio, kiu denove estas la samo kiel la sankta spirito aŭ la konscio de Dio. Ĉar ĉi tiu stadio donas al la individuo la plej altan vivtravivaĵon, la plej altan senton de agrablo, la plej altan travivaĵon de scio, forto kaj kapablo, ĝi estas la kulmino de la vivo kaj la celo, al kiu ĉiuj homoj de la tero rapidas. Tiel, ĉiu unuopa el ni estas reĝo en propra regno, kaj aspiras al formo de regado, kiu estas analoga kun la regado uzata de la plej alta makroestulo aŭ de la reĝo de la universo mem, la eterna Dio.

Fino de parto 3 el 3

* * *

Ĉi tiu artikolo n-ro M0537 baziĝas sur manuskripto, kiun Martinus verkis kiel preparon al prelego en la prelegejo de la Instituto dimanĉe la 24-an de aprilo 1949. Prilaboro kaj aldono de alinotitoloj de Ole Therkelsen estas aprobitaj de la konsilio la 22-an de aprilo 1997. La artikolo “Gudesønnens kongerige. Skytsengle i jordbevidstheden” estis publikigita unuafoje en la dana Kosmos n-ro 3-1998. Ĝi estas daŭrigo de la du antaŭaj artikoloj “Gardangeloj en la servo de la nacio” kaj “La gardangeloj de la lumo kaj la mallumo”.

Traduko Henning Sato von Rosen, Hakan Lundberg kaj Jonas Dalmose en 2010.



La ideala vivsinteno - de Martinus

Demando pri evoluigo de toleremo:

”Kiel eblas al iu homo atingi tiun toleremon pri kiu vi parolas? – Multajn homojn mi ne povas toleri, kaj tute ne ami, kaj mi ne komprenas kiamaniere mi povus iam ajn atingi tion.”

Martinus respondis:

”Ami sian proksimulon ne dependas nur de la volo, sed same kiel estas ekzemple por muzika talento, tiu konduto estas bazita sur kunnaskita talento. Ĝi estas rezulto de antaŭa konstanta trejnado aŭ ekzercado eventuale okazinta dum pluraj vivoj. Tiu ekzercado finfine rezultigas kulminon de la talento, kaj tiam la individuo aperas kiel geniulo sur la koncerna kampo.

La kreado de tiu morala genieco aŭ la perfekta kapablo ami sian proksimulon okazas grandparte aŭtomate per la spertado de suferoj, kaj sekve tie estas ekster kontrolo de la volo. Sed ĉi tie mi mencias kelkajn el la plej gravaj faktoroj en tiu parto de la kreado de la talento, kiu estas submetita al la volo. Surbaze de tiuj faktoroj la individuo povas konscie kunlabori en sia propra kreskado al vera aŭ perfekta manifestado de amo:

1. Forigu la nocion "malamikoj" el via konscio.
2. Neniam kontraŭdiru koleron, kalumnion aŭ aliajn formojn de malagrabloj direktitaj al vi.
3. Neniam mem diru ion malbonan pri iu aŭ io.
4. Estu absolute vera aŭ sincera en ĉiuj rilatoj de la vivo.
5. Estu absolute neinfluebla de flato, laŭdo aŭ riproĉo.
6. Neniam kunagu por mortigi, vundi aŭ korpodifekti.
7. Neniam forlasu la penson pri tio, kiamaniere vi absolute plej bone povas utili al viaj kunestuloj. Tiam vi praktikas la plej altan formon de joko aŭ plej perfektan trejnadon en tiu parto de la evoluo kiu troviĝas en la regiono de via volo. Kaj en kunligo kun la cetera parto de la prilaboro de via naturo fare de la vivo, tio finfine kondukos vin al la morala genieco, transformas vin al perfekta estulo aŭ "dihomo".

La demando kaj la respondo el dana Kosmos n-ro 3, 1933. Demando n-ro M3036.



Prefere krozi sur la Atlantika maro per trunkflosilo ol havi laboron en oficejo - de Martinus

Kara N.N.

Antaŭ longe mi ricevis leteron de vi. Mi pardonpetas, ke mi ne trovis la tempon respondi al vi pli frue.

Mi vidas en la letero, ke vi estas tre malkontenta pri via vivo. Vi skribas inter alie, ke nenio estas por vi tiel malamata kaj abomena, kiel esti dungita en ordinara laboro. Ĝi havi fiksan tagplanon – kaj ĉiam la saman, kaj havi la devon obei aliulojn kaj funkcii kiel marioneto por fari ion, kio neniel koncernas vin. Ĉiu ajn oficejo aŭ butikoj estas por vi malamata, "kiel la diablo mem", kaj vi preferus krozi sur la Atlantika maro per trunkflosilo kun la danĝero esti glutata de la maro, anstataŭ preni laboron en oficejo aŭ en la komerca mondo kaj esti glutata de ĝi – se vi mem povus elekti.

Krome vi skribas, ke P.P. ne povas kompreni tion, kvankam vi opinias, ke la afero estas facile komprenebla.

Jes, kara N.N. Via stato estas sufiĉe facile komprenebla. Vi priskribis ĝin tre klare en la letero. Sed la kaŭzo de via stato – temas ja pri ĝi. – Mi bone komprenas P.P.. Li estas eksterordinare diligenta homo, preta por fari ĉiun ajn laboron, kiun oni postulas de li. Li malfacile komprenas vian

staton, kiu estas centprocente mala al lia stato. Sed nun vi petis helpon de mi, kaj nun mi klopodas informi vin.

Via vivsinteno estas do malami dungon, kaj malami ordinaran laboron, malami submeton al aliuloj, malami ion, kio ne koncernas vin. Ĉi tie vi mencias la oficejan – kaj komercan mondojn, kaj ĉion kion vi malamas kiel ”la diablon mem”. Ekde la infanaĝo ĉiuj homoj en la mondo estas edukataj por tio, ke ili enspezu monon por vivteni sin tiel, ke ili ne estu ŝarĝo por aliuloj. Ĉi tiun absolute sanan kaj vivnecesan sintenon vi tute rifuzas. Vi substrekas tion dirante, ke vi malamas tion kiel ”la diablon mem”.

Sed pripensu, kiom multe vi mem ŝuldas al la ordinara laboro. – Se ĉiuj aliaj homoj malamus la ordinaran laboron kaj same kiel vi povis eviti partopreni en ĝi kaj eviti havi konstantan laboron, kiel vi do povus ĝui ĉiujn bonaĵojn, kiujn vi ĉiutage tute nature konsumis ekde via naskiĝo. La kaŭzo de tio, ke vi povas porti belajn agrablajn vestojn kaj ŝuojn, ke vi povas loĝi en agrabla domo aŭ agrabla apartamento, ke vi povas ricevi kuracistan helpon en hospitalo, se tio necesas, ke troviĝas elektro- kaj gasfabrikoj, lernejoj kaj universitatoj, literaturo, arto kaj scienco ktp. ktp., do tion kaŭzas nur homoj, kiuj pli aŭ malpli rezignas je tio, kion ili emas aŭ ne emas fari. Kara N.N., ĉiutage vi vivas surbaze de la laboro de tiuj multaj aliaj homoj, kaj tial vi estas granda ŝuldanto al la socio aŭ la ordinara laboro. Ĉu vi nun komprenas, ke estas devojiĝo vivi kaj ĝui agrablaĵojn je kosto de aliaj homoj? Ni ĉiuj estas ŝuldantoj al la proksimulo en la ordinara laboro tiel, ke ankaŭ ni devas kontribui al ĝia konservado. La socio pereus, se ĉiuj, same kiel vi, kondamnis ĝin kaj forfuĝus anstataŭ kompreni ĝian valoron. Se ĉiuj estus parazitoj sur la laboro de aliaj, kiamaniere la laboro do estu farita? – Kial vi devus esti escepto? – Kial vi ne devus labori en oficejo aŭ en alia profesio, kie vi kapablas esti utila? –


Eble vi volas labori pli altnivele ol sur la materia fizika nivelo, sed kiuj de la multaj laboristoj ligitaj en fabrikoj, laborejoj kaj oficejoj aŭ similaj, ne volas fari la samon? Ili donas al vi eblon ĝui la bonon de la civilizo. – Sed pli alta nivelo aŭ kulturstadion ol tiu, kiun la nuna materiisma, sendia kulturo reprezentas, estas idealismo. Vera idealismo estas proksimula amo, tio, ke oni preferas mem suferi anstataŭ aliaj suferu, kaj oni volonte faras la lacigan laboron anstataŭ aliaj faru. La idealismo signifas kompreni, ke ĉio en nia sorto estas destinita por ŝanĝi nin al ”la homo laŭ la bildo de Dio”. Tio signifas kompreni ĉion kaj ĉiujn. Nur ĉi tiu kompreno donas tiun liberon, kiun vi vere deziras, sed kiun vi tute ne povas atingi, ĉar vi ne havas ĉi tiun komprenon kaj la kunligitan idealismon. Tiel longe kiel vi, kara N.N., ne volas esti en kontakto kun tio, kion vi ŝuldas al la homaro en la materia sfero, ĉio en la ordinara laboro, al kio vi esprimas malamon, tiam vi ne estas idealisto. Vi ne estas bona ekzemplo por aliuloj. Kaj sen esti bona ekzemplo vi ja tute ne povas aparteni al pli alta sfero ol ĝuste tiu, sur kiu la aliaj troviĝas. Hodiaŭ vi fakte troviĝas sur la ĝusta nivelo, kosme vidite. Vi havas iomete tro altevoluintan inteligenton kompare kun via humana talento. Tiu stato igas vin senteti pli altan kulturstadion, al kiu vi tre volonte apartenus. Sed via ankoraŭ mankanta humana evoluo kaŭzas, ke vi ne volas pagi la koston por aparteni al tia sfero. Vi ne volas fari la streĉan laboron, kiu necesas por atingi tiun stadion kaj tiun liberon, al kiuj vi treege sopiras. Sed aliaj homoj ne povas iri la vojon por vi. Vi mem persone devas fari la laboron. Kaj tiu laboro estas precize tio, kion vi ”malamas kiel la diablon mem”. Tial vi devas venki tiun malamon, kaj do esti preta volonte labori kiel lavistino, same kiel princino aŭ kiel laboristino en fabriko aŭ oficejo. Via sinteno devas esti pli volonte servi ol esti servata. Estas bone sen malamo kaj amareco fari iun ajn laboron, kiun Dio pere de via sorto postulas de vi. Nepre ne pensu, ke vi estas tro bona aŭ tro altevoluinta por fari ordinaran laboron, kiun la sorto postulas de vi.

Tiel longe kiel vi ne lernis tion, kaj vi daŭre malamas ordinaran laboron, vi denove kaj denove renkontos ĝin por finfine esti kaptita de ĝi. Tio faros barieron survoje al la libereco, kiun vi tre deziras akiri. Kiam vi komprenos, ke la laboro kaj la ordinara okupo, kiujn vi nun malamas, fakte estas necesaj por la vivo, en kiu Dio ŝanĝas vin de ”besto” al ”homo”. Pli volonte vi devas beni ol

kondamni la laboron, kaj tiam la sunluma epoko de la libereco ekbrilos super la horizonto de via sorto. Tiam vi mem komencos ekbrili por aliuloj. Vi ne devas kredi ke la plej grandaj saĝuloj estas homoj, kiuj timas fari simplan laboron, kaj ke ili kaŭze de tio estas tiom altevoluintaj en la spirito. Male estas homoj pretaj por fari kiun ajn laboron, se ili povas helpi aliajn homojn al pli granda lumo kaj pli bona ekzisto. Ili estas tiom altnivelaj, ĉar ili naskiĝis en nia mondo por servi kaj ne por esti servataj. Estas memorinde, ke Kristo estis ĉarpentisto, same kiel ankaŭ liaj disĉiploj havis civitanan metion. Mi mem partoprenis la civitanan metion ekde mia 12-a jaro. Mi estis paŝtista knabo, bienservisto, laktejisto, nokta gardisto kaj finfine kontoristo. Tiam komenciĝis la spirita stato en mia vivo, kiam mi ricevis liberecon por labori pri la plej altaj problemoj de la vivo. Post kiam mi komencis skribi mian grandan ĉefverkon, Livets Bog "La Libro de la Vivo", mi devis ankoraŭ unu fojon funkcii kiel laboristo por vivteni min. Neniam en ĉi tiuj situacioj mi sentis min amara aŭ kolera, kvankam mi kompreneble ne sentis ilin kiel plenumon de la idealoj aŭ celoj de mia vivo. En tiuj situacioj mi ĉiam sentis ke mi laboras por Dio, kaj ke la laboro estu farenda. Grandskale mi sentis ke mi vivas pere de laboro de aliuloj. Tial ankaŭ mi devis labori sammaniere tiel longe kiam mi ankoraŭ ne estis matura por fari tiun spiritan laboron por Dio, kiu poste altgrade fariĝis beno por mi.

Jes, kara amiko! Mi deziras, ke mia letero al vi estus pli agrabla, sed mi ja devas esti tute sincera al vi. Mi prijuĝis vian staton laŭ via letero, kaj mi bone sentas kiom embarasa ĝi estas por vi. Tial mi zorgeme trovis informojn, kiujn certe povas helpi vin for de purgatorio, kaj, se vi mem volas, doni al vi la grandan vivĝojon, tio estas vivi nur por servi sian proksimulon kaj sekve esti ĝojo kaj beno por ĉio vivanta.

Kun la plej koraj salutoj, Martinus



Redono de letero de Martinus, datita 1959.09.12, el dana Kosmos, n-ro 12, 1993. La letero de Martinus "Hellere krydse Atlanten på en tømmerflåde end job på kontor" estis publikigita unuafoje en la dana Kosmos n-ro 12-1993. Artikolo n-ro M32374. Traduko de Else Hjorth, kontrolita de Ib Schleicher.

* * *

La monda ŝtato - de Ole Therkelsen, parto 1 el 2

1. Nova scienca monda moralo

Martinus faris novan mondbildon por doni logikan kaj sciencon klarigon de la kaŭzoj pro kiuj al homo penvaloras esti bona kaj amema. Tio eble sonas kiel trosimpligo, sed la homoj iam vidos ke valoras la penon esti bona – ĉar niatempe la homoj estas tiel prudentaj kaj raciaj ke ili faras nur tion kio ŝajnas repagi la penon.

Martinus do en ordinara lingvaĵo povis diri tute simple: "Mia misio estas montri ke penvaloras esti bona".

La tasko de la scienco estas montri al la homoj kio repagas penon, kaj kio ne repagas penon.

Tio eble sonas cinike, sed tiel ne estas, se oni nur komprenas ke temas ne pri mono, sed entute pri tio kio estas pozitiva kaj kio estas negativa al la homoj.

Certe la ordono de amo jam estas la kerno de la humanaj mondaj religioj, sed tie ĝi prezentiĝas en formo de religiaj dogmoj kaj instruoj. La moderna intelekta homo tamen postulas logikan kaj intelekte subtenatan klarigon, kaj la celo de la Mondbildo de Martinus estas kontribui al la kreo de *nova scienca monda moralo*.

Estas dirite ke oni ĉiujn pardonu, sed ne sufiĉas por krei novan kulturon nur aserti aŭ postuli ke oni ĉion ajn toleru kaj ĉion ajn pardonu.

Esti tolerema kaj ĉion *pardonu* en sia propra konscio ja ne signifas ke oni devas ĉion *permesi*. La socio rajtas protekti sin, sed ne puni kaj venĝi. La homaro iam tute ŝanĝos sian nunan punsistemon al pure humana praktiko, kie oni protektos la socion kontraŭ la krimuloj kaj iliaj agoj, ne uzante punon nek brutalan kaj primitivan enkarcerigadon. (LB7 par. 2400).

Multaj ne estas preparitaj por pardonu, kaj alimaniere ankaŭ ne povas esti nun. Sed la pardonado necesas por aboli armilojn kaj militon, kiuj eĉ estos tuttere malpermesitaj. Tiun aferon oni tre longe diskutos, ĉar multaj diros ke oni ne povas malhavi armilojn. Sed spite tion ĉia armil-fabrikado kaj milito tute malaperos for de la tero rezulte de la evoluo, laŭ Martinus. Pendante sur la kruco en la plej severa doloro Kristo diris: “Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras”, kaj ĝuste tiu krista moralo kaj totala pardonu formos la bazon de la kreado de nova monda kulturo.


Por krei surteran regnon de sano, paco kaj amo necesas mondbildo kiu esprimas ĉiujn grandajn regulecojn de la vivo. La kreo de justa internacia mondregno ne nur estas demando de evoluigo de la materiaj sciencoj, ĉar samgrade gravas la demando krei *sciencon de homaj agado kaj estado*.

Dum la homoj ankoraŭ ne havas tian sciencon, ilia reciproka kunvivado ne povas fariĝi perfekta. Tia scienco de la amo, kiun kreis Martinus, do estas antaŭkondiĉo de la establo de daŭra paco sur la tero.

2. Kvantuma salto en la tuttera cerbo

En sia evoluo la terglobo troviĝas ĝuste nun en la plej granda ŝanĝo de evolua spiralo, kio implicas ke ĝi evoluas el meze de la “*besta regno*” estinte 100-procente egoisma estulo, al la sojlo de la “*vera homregno*” fariĝante 100-procente altruisma kaj ama estulo. Martinus ne uzis la esprimon kvantuma salto, kiu moderniĝis lige al la nuntempa konsci-evoluo. Male, Martinus fortege emfazis, same kiel cetere ankaŭ Karolo Darvino (Charles Darwin, 1809-1882), ke la evoluo ne okazas *en saltoj*, sed ke ĉia evoluo okazadas grade kaj kontinue danke al konstantaj ŝanĝetoj. Tial al mi persone ne plaĉas la esprimo kvantuma salto lige al konsci-evoluigo, ĉar tio multajn kredigas ke ili povas fari tian kvantum salton per meditado, ke ili povas atingi kosman konscion en ĉi tiu vivo aŭ sia nuna enkarniĝo. Tio estas tute malebla al la homoj sur ilia nuna evolu-ŝtupo.

Tamen estas vero ke okazas sur la terglobo tre grandaj ŝanĝoj ene de relative mallonga tempo, se konsideri ke la vivo ekestis antaŭ ĉirkaŭ 3,8 miliardoj da jaroj, kaj ke ni antaŭ 3,8 milionoj da jaroj estis kvazaŭ simioj. Laŭ Martinus la terglobo nun komencis sian iniciĝan procezon, kiu kaŭzas ke post 3000 jaroj ĝi havos kosman konscion kaj iros kun la homoj en la veran homregnon. (Vidu simbolon n-ro 26, La venonta perfekta homregno, en La eterna mondbildo 2).



© Martinus Institut 1981

martinus.dk

Simbolo n-ro 26 La venonta perfekta homregno

3. La vera homregno post 3000 jaroj

La homa evoluo same kiel ĉiu alia evoluo en la naturo estas laŭregula kaj iras kun natura rapideco en unu tute difinita direkto. Konante la leĝojn de la evoluo, Martinus povis ĝuste antaŭdiri la iradon de la estonta evoluo.

Kiam temas ekzemple pri nenaskita infano, oni facile profetas ke ĝi komencos marŝi post unu jaro kaj paroli post du jaroj, kaj ke ĝi puberiĝos je iu difinita aĝo kaj plenkreskiĝos je iu difinita aĝo. Same kiel ekzistas por infanoj difinitaj evoluŝtupoj trapasotaj, antaŭ ol ili plenkreskiĝas, tiel ekzistas ankaŭ difinitaj evoluŝtupoj trapasotaj de ĉiu loĝata planedo, kiam ĝi evoluas al la plenkreska aŭ perfekta stadio.

Tiel same eblas paroli pri tio ke planedo trapasas diversajn embriajn kaj infanajn stadiojn en sia evoluo. Martinus tiamaniere ankaŭ povis antaŭvidi ke la terglobo el sia nuna dekkelkjarula aŭ pubera stadio evoluos plu ĝis la plenkreska stadio.

Post la unua mondmilito estis fondita LdN, la Ligo de Nacioj, kaj post la dua mondmilito estis fondita UN, la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj ambaŭ devas esti rigardataj kiel embriaj stadioj survoje al la kreo de la monda ŝtato.

“Internacia mondregno kreiganta” estas la titolo de ĉapitro 4 de *Livets Bog 1* (LB1), kaj tie Martinus en kvindek paĝoj pritraktas la ĉefprincipojn kaj la antaŭkondiĉojn de la kreo de unu monda ŝtato sur tiu ĉi nia blua planedo.

“La venonta perfekta homregno” estas la titolo de la simbolo kiun Martinus klarigas en *La Eterna Mondbildo 2*, ĉapitro 26, kiun oni ankaŭ povas rigardi kiel koncentraĵon de la dirita 4-a ĉapitro de LB1.

Nur tre malofte Martinus en sia verkaro indikas konkretajn tempojn de la evoluo, sed kelkfoje tio povis okazi en prelegoj kaj demandaj lecionoj. Sed en la ĉefverko li indikas ke la pliparto de la surteraj homoj post ĉ. 3000 jaroj estos finevoluintaj homoj kun kosma konscio, kaj tiuj finitaj homoj tiutempe estos establintaj internacian mondregnon ĉi-tere kun cirkonstancoj tiel justaj, belaj

kaj mirindaj ke oni devas rigardi ĝin kvazaŭ teran paradizon. La tera homo de hodiaŭ ankoraŭ estas unu el la mamuloj, sed post 3000 jaroj ĝi do forlasos la “bestan regnon” kaj suriros novan ekzistonivelon, kiun Martinus nomas “la vera homregno”, kie ĉies psiko aŭ konscio estos liberigita pri la lastaj restaĵoj de siaj bestaj konsci-tendencoj. (LEM1 par. 11.42; LB1 par. 248).

Do en la daŭro de 3000 jaroj la pensoj de la homoj transformiĝos el egoismaj kaj negativaj pensospecoj al pozitivaj, amaj kaj logikaj pensoj, kiuj unuigos ilin en unu regno, kaj ne temos nur pri la unuiĝintaj ŝtatoj de la mondo, sed pri tio ke ĉiuj ŝtatoj unuiĝos en unu tutmondan regnon.

4. Krista politiko post 500 jaroj

En prelegoj kaj interparoloj Martinus tamen povis doni kelkajn pliajn kronologiajn taksojn pri la evoluo. Antaŭ ol la mondo fariĝos unu ŝtato, unu subcelo estos la establo de la unuiĝintaj ŝtatoj de la mondo, kompare al kiu la nuna UN estu rigardata nur kiel ĝia embria stato. La establo de la unuiĝintaj ŝtatoj de la mondo, tuttera regno de paco, daŭros kredeble nur ĉ. 5-600 aŭ 700 jarojn laŭ eldiro de Martinus surbendigita.

En prelego konekse al la vera homregno venonta post 3000 jaroj Martinus menciis ke post ĉ. 1500 jaroj la unuaj homoj komencos havi kosman konscion kaj ekkapablos materiigi sin en la fizikan mondon. Sed jam antaŭ tio la homoj komencos travivi kosmajn ekbrilojn.

Homojn kun kosma konscio Martinus nomas “kristaj estuloj”, tial ke ankaŭ Kristo havis kosman konscion. Kristo krome estis sur tiu evoluŝtupo kie oni delonge lasis la bestan regnon kaj enhejmiĝis en la vera homregno kaj en la spiritaj regnoj. (LEM3 par. 33.73).

En sia 90-jara naskiĝtago en 1980 en sia lasta publika prelego antaŭ 1200 aŭskultantoj en Falkoner Centret en Kopenhago, Martinus indikis tempodaŭron de 500 jaroj, kiu sufiĉus por atingi subcelon en la evoluo al la vera homregno, nome tiam kiam estos kondukata justa politiko konforme al la principoj de la ĉioamo.

Martinus diris: “Multaj homoj trovas la kristanismon naiva kaj kredas ĝin pasintaĵo. Sed nun venos periodo kun nova kulturo, en kiu oni kondukos kristan politikon. Mi taksas ke estos tre granda krista politiko en la mondo post 500 jaroj.” (Kosmos n-ro 8/1991, 9-10/2004).



5. Kial Martinus ne eniris politikon?

Pluraj homoj entuziasmiĝintaj pri la analizoj de Martinus demandis lin kial li ne eniru politikon. Laŭ ili, li povus tie estigi diferencon kaj tiamaniere helpi krei pli bonan mondon. Al tio Martinus respondis tre mallonge kaj precize: “Oni ne povas ŝanĝi homojn per politiko”.

Kontribue al la kreo de pli bona mondo li nenion pli bonan povus fari ol krei la kadrojn de *nova scienca monda moralo*, farante kosmajn analizojn kaj ellaborante sian kompletan verkon *La Tria Testamento*.

Eĉ se oni enkondukus la plej bonan penseblan politikon, oni ne povus ŝanĝi la spertomason aŭ la talentomason de la unuopa homo kaj per tio lian evolu-ŝtupon. Kiel ekzempleton oni povas mencii ke en la eksa Sovetunio oni provadis per politiko igi ĉiujn ateistoj, sed post la disfalo de la unio la ortodoksa eklezio kaj la subpremita religieco reekfloris. Ne, oni ne povas ŝanĝi homojn per politiko.

La transformiĝo de la homoj el egoismaj al altruismaj estuloj ne estas demando de volo aŭ de decido. Ĉiu unuopa estulo evoluas nur surbaze de siaj propraj travivaĵoj kaj spertoj.

Koncerne politikon kaj politikistojn ni do havas tiujn politikistojn kiujn ni meritas. Estas konsekvenco de nia evolu-ŝtupo kaj de la leĝo de altiriĝo kaj forpuŝo, ke ni estas naskataj ĝuste sur tiun planedon kaj en tiun landon kiuj plej konformas al nia evoluo.

Kvankam oni eble ne povas homojn ŝanĝi per politiko, tio tamen ne malhelpas ke tiuj politikistoj kiuj estonte havos la gvidadon, plene konforme al la pli alta evoluŝtupo de la homo favoros tian tutterglobe komplete ĉioaman kaj justan politikon, kiun Martinus nomas “krista politiko”.

Ama kaj justa politika sistemo ne povas esti bazita sur ekonomia kaj milita potenco, sed sole sur socia ekvilibro, en kiu neniu homo estos ekspluatata aŭ subpremata.

6. Libereco kaj paco

“Amo signifas doni liberecon”, Martinus diras tute mallonge. Politiko bazita sur ĉioamo estas esprimo de la plej alta formo kaj de demokratio kaj de komunismo, de libereco kaj de paco.

Ĉiuj homoj sopiras la grandan celon, la liberecon. La homoj serĉas liberecon en ĉiuj kampoj, interalie en politiko, scienco, religio kaj arto. Sed ofte oni vidas, ke kiam homoj provas liberigi sin pri la eksteraj ligoj, tio okazas koste al la paco.

Homoj ankaŭ povas esti ligitaj en malsanoj kaj malĝojaj sortoj. Por liberiĝi ili devas akiri klarecon pri la ligoj kiuj bridas ilin. La homoj devas lerni vivi en kontakto kun la leĝoj de la naturo kaj de la vivo por povi fariĝi tute liberaj. Ofte homoj kredas ke malhelpas ilian liberiĝon la eksteraj ligoj, dum la kosmaj analizoj montras ke ili estas ligitaj pro tio ke ili estas disreviĝintaj, kritikemaj, agacitaj, koleraĵ ktp. Per tiaj pensoj oni sin ne liberigas, male oni sin ligas al aliaj homoj.

Se oni volas konstrui mondon en kiu ĉiuj homoj vivos en libereco kaj paco, oni facile komprenos ke la libereco kiun oni volas atingi ne estu akirota koste al la libereco de aliaj. Se oni volas fari mondon en kiu ĉiuj estas feliĉaj, la akiro de feliĉo fare de unu persono neniam povu okazi koste al la feliĉo de aliaj. *Tio estas scienca logiko.*

7. Ĉu ideala socio estas utopio?

La ideo de nova kaj pli bona mondo vivas de post kiam niaj pragepatroj komencis revii pri la paradizo. En la mezepoko ekestis la imago pri Kuklando, en kiu ĉiuj homoj povus vivi senzorge. Saĝaj homoj desegnis mapojn pri tiu mirinda lando, kiu laŭdire situus ĉe la riveroj Eŭfrato kaj Tigriso en la nuna Irako.

La angla juristo, ŝtatiso kaj aŭtoro Thomas More (1478-1535) skribis libron kiu estis fikcia vojaĝpriskribo de la ideala socio *Utopia*. Li la unua ekdiskutis la ideon ke nova kaj pli bona mondo estas io kion ni mem devas peni por konstruadi. La utopio de Thomas More baziĝas sur du modeloj de la antikveco, nome *La Ŝtato* de Platono kaj *Veraj rakontoj* de Lukiano.

La fondo de la komunisma Sovetunio kaj de la libera urbo Christiania ankaŭ estas rigardeblaj kiel provoj krei idealan socion.

Ankaŭ laŭ Martinus ni mem devas peni por konstrui tiun idealan socion. Sed tio ne estas afero kiun oni povas simple decidi fari, ne estas demando de volo, estas demando de evoluo. Por laboro bona, temp’ estas bezona!

Tio kio hodiaŭ malhelpas la homojn starigi idealan socion, estas do ilia imanenta besta aŭ

egoisma naturo. Sur la nuna evoluŝtupo tial ankoraŭ ne eblas fari idealan socion, ĉar la tera homo kiel dirite estas estulo sfinksa, duone besto kaj duone homo. Unuflanke ni havas bestajn kaj egoismajn tendencojn, aliflanke ni havas humanajn kaj altruismajn tendencojn.

Multaj homoj diras ke ĉiam estis milito, kaj milito ĉiam daŭre estos. Ili opinias ke estas utopio kredi ke la homoj iam sukcesos fari idealan socion.

Martinus diras male ke la kreo de tia ideala socio estas neevitebla, ĉar danke al la regulecoj de la evoluo li povas montri ke la evoluo senperfide certe kondukas al la kreo de vera homregno sur la tero. Ĝi ne povas malsukcesi; la kreo de ideala socio ampleksanta nian tutan planedon estas deviga ŝtupo en la plua evoluo.

8. Ĉu la evoluo estas laŭdirekta?

La evoluo same kiel ĉiuj aliaj fenomenoj en la naturo estas submetita al difinitaj naturleĝoj, kiuj kaŭzas ke ĝi fakte estas kiel unudirekta strato. La evoluo povas iri nur laŭ unu direkto, nome supren kaj antaŭen. Ĉia evoluo estas bazita sur akumulitaj spertoj. La maso de spertoj nur povas kreski, kaj tial la evoluo estas unudirekta, ĝi nur povas konduki al perfekteco. Loke povas ŝajni ke la evoluo iras malantaŭen, kiam oni faris erarojn, sed ĝuste la spertado de la konsekvencoj de la eraroj estas tio kio antaŭenpelas la evoluon. Cetere oni evoluas ĉiufoje kiam oni trejnis aŭ ekzercis sin. – Laŭ Martinus la diraĵo “ekzercado faras la majstron” estas kosma vero. Ĉiufoje kiam oni ion travivis aŭ spertis, oni evoluis.

La rezulto aŭ la esenco de ĉia ekzercado kaj spertado koncentriĝas en iuj mikro- kaj supermikrokosmaj energiaj strukturoj, kiujn Martinus nomas talentonukleoj, kiuj enposteniĝas en la eterna parto de la strukturo de la estulo, tiel ke la spertorezultoj postvivos la pereon de la korpo. (LEM2 par. 17.4). La temo de talentonukleoj kaj evoluo estas la ĉefa temo de mia libro *Martinus, Darvino kaj inteligenta dizajno* (danlingva, Borgen 2007).

Homo ricevinte sufiĉe multe da militaj spertoj ne plu volas iri al milito. Kvankam povus ŝajni ke la evoluo iras malantaŭen, militado tamen estas la vojo al paco.

La homoj ne nur satiĝos pri milito, ili ankaŭ satiĝos spertante la efikojn de besta kaj egoisma kondutmaniero. Tiu formiĝado de spertoj kaŭzos ke la egoismo reale fariĝos la vojo al humaneco, same kiel malsanado estas la vojo al sano.

Oni ne povas riproĉi al la bestoj ke ili estas egoismaj, la memkonserva instinkto estas dia dispono, kiu kaŭzas ke ĉiuj bestoj luktas por pluvivi en la senindulga besta regno, kie la ekzisto estas batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj.

Sed en la sociala ŝtato la kulturhomoj iom post iom povos vivi sen la memkonserva instinkto tiel necesa al la bestoj, kaj iom post iom anstataŭos ĝin humana instinkto aŭ urĝiĝo helpi la malfortulojn. Ĉi tiu spertobazita laŭgrada evoluado de la humaneco estas tio kio konsistigas la naturan bazon por establo de la perfekta humana mondregno sur la terglobo.

9. La ŝtato estas reprezentanto de la altruismo

Estas facile kompreneble ke libereco estas la granda idealo por la homoj, sed ja prefere estu “libereco sub respondeco”, laŭ kutima diro. La bestoj ja ankaŭ estas liberaj en la ĝangalo, kaj tie la fortuloj havas la liberecon kaj la rajton subigi al si la malfortulojn kaj eĉ mortigi ilin.

Sed kontraste al la ĝangala leĝo la unua formo de humana leĝodonado ĝuste strebas protekti la malfortulojn, kio povas okazi per tiaj leĝoj kiel: ne ŝtelu, ne mortigu. Tiaj leĝoj protektas la malpli fortan kontraŭ ekspluato fare de la pli forta. La ŝtato kun leĝodonado tial estas *reprezentanto de la altruismo* en la homaj socioj. La leĝaro ankoraŭ estas neperfekta kaj ne tute justa, sed ĝi estas evoluigata.

En la riĉaj socialaj ŝtatoj oni nun vidas ke estas farita longa vico da leĝoj kiuj provas, tiom kiom eblas, protekti ekonomie malpli favoratan homon kontraŭ ekspluato fare de iu pli ruza aŭ

forta. Estas klare videble ke dum la homoj iĝas ĉiam pli humanaj, ili ankaŭ favoras pli justan dividon de la bonoj kaj resursoj de la mondo. Kio efektive estas la argumento por maljusta divido de la valoroj de la terglobo? – Liberalismo kaj kapitalismo! – Estas la rajto de la plifortuloj ekspluati la malpli fortan, la samo kion ni vidas en la ĝangalo.

Aliflanke, por esti justa necesas diri ke sur la nuna evolu-ŝtupo liberalismo kaj kapitalismo estas la sistemo plej bona kaj plej stimula por homoj, sed sur pli alta evoluŝtupo oni rerigardos ĝin kiel sistemon maljustan, primitivan kaj kruelan.

10. La privata kaj la komuna interesoj


Same kiel povas esti en la menso de la unuopa homo batalo inter la besta kaj la homa tendenco, inter egoismo kaj amemo, tiel ankaŭ en la konscio de la terglobo okazadas batalo inter la besteco kaj la homeco. En la monda socio tia batalo okazas en la formo de luktado inter “la privata intereso” kaj “la komuna intereso”. La privatan intereson reprezentas “la mona potenco”, dum la komunan intereson reprezentas “la ŝtata potenco”. Ĉar la mona potenco ne rezignas libervole pri siaj povoj, ni vidas laborkonfliktojn inter labordonantoj kaj laborprenantoj. El la flanko de la ŝtato ni vidas leĝproponojn kies celo estas limigi la kapitalpotencon per pli justa disdivido de la mono en la socio. Ĉiuj tiuj aferoj estas pli detale analizitaj en LB1, ĉap. 4, par. 95-104.

La moto de la privata intereso kaj egoismo estas “ĉiu por si mem estas la plej kara”, dum la moto de la komuna intereso kaj malegoismo estas “pli feliĉe estas doni ol ricevi”.

Je tutmonda nivelo la “naciismo” estas esprimo de la egoismo de la landoj, kaj la “internaciismo” estas esprimo de ilia malegoismo. La evoluo iros laŭ la direkto de tio ke la malegoismo aŭ la komuna intereso alproprigos al si ĉiujn valorojn de la tero. Tia demokratia komunismo estos enkondukebla ne per “revolucio”, sed sole per “evolucio”.

En tiu tuttera evolu-procezo oni klare vidas ke ĉiam pli necesiĝas tutmonda aŭtoritato kaj senpartia internacia kortumo.

Daŭrigo kaj fino parto 2 el 2 en sekva numero. Traduko de Jens Stengaard Larsen el la libro "Martinus kaj la nova monda moralo".



Reklamkampanjo por Esperanto - de Etsuo Miyoshi

Inter januaro kaj julio 2023 mi okazigas reklamkampanjon por Esperanto en ĵurnaloj de Francio (Le Monde kaj Les Echos), Germanio (Frankfurter Allgemeine, Süddeutsche Zeitung, Die Zeit) kaj Pollando (Gazeta Wyborcza).

Alterne tri diversaj tekstoj estos publikigitaj kun la jenaj ĉeftitoloj: “EU jes; € jes; Esperanto?”, “Daŭripova paco Esperante!” kaj “EU forigos la anglan dominadon” klarigas, ke se EU adoptos Esperanton, ĝi kaj la angla estos komunaj lingvoj”. Ene de 10 jaroj la homaro surpriziĝos pri la revolucia facileco de Esperanto kaj sekve rifuzos plu lerni la anglan.

Ili enhavos diversajn informojn kiel Esperanto, Ludoviko, UK ktp. Kun emfazo pri la jenaj aspektoj:

Ekonomia kaj media: Anglaj tekstoj okupas 1,2-oblan spacon pli, germanaj 1,5-oblan kaj duonon de iliaj vortaroj okupas esceptoj. Esperanto ŝparas energion kaj kontribuas por la medio.

Facila: 5-oble pli facila ol la angla, 10-oble pli ol la rusa kaj araba, konciza, regula, kun latindevenaj radikoj kaj afiksa sistemo permesanta la kreon de novaj vortoj.

Justa: Malgraŭ leĝaj reguloj, anglalingvaj denaskuloj havas diskriminacian avantaĝon super C1-nivelaj diplomitoj.

Misia: Helpas konservi 577 krize endanĝerigitajn lingvojn tiel ke povos resti 7151 lingvoj.
Lernado: www.esperanto.net.

Mia libro Mia poliomjelito malŝlosis pordon al daŭripova paco: Invento, Sano, Lingva egaleco estis publikigita en la angla, franca kaj germana en Kindle (EUR 9,00). Viaj opinioj pri la verko estos alte taksataj en Kindle. La reklamoj en Pollando informos pri la anglalingva versio.

En miaj klopodoj mi estis subtenata de konsiloj de Renato Corsetti, Seán O’Riain, Margareta Zamenhof, Barbara Pietrzak, Emma Breuninger, Agneta Emanuelsson, Xavier Godivier, Tuomo Grundström, David López-Rueda, Emanuele Regano, Ileana Schröder, Lode Van de Velde kaj Atilio Orellana Rojas, mia sekretario. Foton disponigis Petr Baláž.

Ĉiutage mi preĝas al Dio por eviti diversajn valojn ĝis la fino de la reklamkampanjo. Mi ne povus morti antaŭ ol persvadi EU-gvidantojn, kiel la EK-prezidanto Von Der Leyen, la franca prezidento Macron ktp., ke EU forigu la anglan dominadon.
lamkampanjo. Mi ne povus morti antaŭ ol persvadi EU-gvidantojn, kiel la EK-prezidanto Von Der Leyen, la franca prezidento Macron ktp., ke EU forigu la anglan dominadon.

Laŭ permeso de revuo Esperanto (n-ro 2, 2023)



Informado pri la Martinus-instituto

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton.

La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 3838 0100 Telefonto: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk, esperanto@martinus.dk, shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.

Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron kaj epub-libron.

Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Martinus-Instituto
Mairendalsvej 94-96,
DK-2000 Frederiksberg,
Kopenhago,
Danio